

Esperanto-Numismatika Asocio



Esperanta Numismatiko

2026

Jarkolekto 13 - Numero 2



ENHAVOTABELO

de aprilo 2026

Titolpaĝo:	1
Enhavotabelo	2
De ni por ... ni!	3
Moneroj & medaloj	4
<i>Franca distinga medalo por brazila esperantista meritulo</i>	
<i>Plaketo honore al Abdul Baha (1844 - 1921)</i>	
<i>Diversaj aplikoj de la sama medalo</i>	
<i>6^a Beneluksa Kongreso Haarlem 1959</i>	
Aspektoj de numismatiko: Mondvastaj iamaj monerpesiloj (1).....	11
Valormarkoj & valorbiletoj: Parte restanta biletaro varbila	13
Medalistoj: Familio Fattorini	15
Por spuremuloj!	17
Spikumajoj & suplementoj: Afiŝo pri la 100a jubileo.....	18
Historiaj aspektoj: Kiam numismatiko fariĝis scienco?	19
Kiel komenci numismatikan kolekton?	
Terminaro: Alfabeta listo (45)	22
Numismatika forumo: Oro pro nobis! (2)	23
El la gazetaro:	25
Retpoŝto	26
Anoncoj & eventoj	38

Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts	Kontakto: bert.boon@skynet.be
Provlegado: Jozefo Horvath	Retejo: ena.frali.net
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!	www.esperanto.es/biblioteko
Finredaktoro: Bert Boon	www.kolektado.esperanto.cc

DE NI POR ... NI!

*“Iu devas paroli, laŭte paroli
kaj eldiri ĉion,
kostu kiom tio kostas”
(José Américo de Almeida 1887-1980)*

En nia freŝa enkonduko ni celas nun spoti du diversajn aspektojn de esperantismo. Tamen ni unuavice emfazu ree, ke ĉiuj rubrikaj per bildoj kaj klarigoj ilustras, kiel kutime, la diversajn aspektojn de la esperanta numismatiko, do ankaŭ en ĉi printempa numero dua de 2026.

Unuflanke: la baza ideo de Ludoviko estis universala paco. Kvazaŭ sensukcese li senĉese bataladis kontraŭ monda malamikeco, per la helpo de nova, mondvasta komunikilo, provante unuigi la anojn de diversaj kulturoj de “Homo sapiens”, domaĝe makulitaj per tio, kion la klasikaj grekaj filozofoj nomis “hybris” (=megalomanio), per kiu nia specio ekde la komenco sin morale montris barbara kaj fihoma. Tio konfirmas la “teorion” de Karlo Darvino, klarigitan kiel *struggle for life* (=batalo de ĉiu kontraŭ ĉiuj, por sukcese postvivi).

Zamenhof ne nur estis la iniciatinto de pacocela projekto, sed ankaŭ edzo kaj patro. Tial estas, laŭ mi, nur amara konsolo, ke li jam mortis antaŭ la fino de la kruela “Granda Milito”, nescia de la terura sorto de du el siaj infanoj, longe poste murdotaj en naziaj koncentrejoj.

Dum la du mondmilitoj - laŭ la tradicio - esperantistoj subtenis diversmaniere aliajn viktimojn de tiuj teruraj buĉadoj. Aktuale, koncerne la mondvastajn konfliktojn, “*milionoj da mortigoj daŭre ne sufiĉe estas priparolataj*”, konstatas Roberto Pigro, korespondanto de “Monato”. Kial do oni, *inkluzive la esperantan movadon*, preskaŭ mutas, ne sufiĉe protestas kaj ne organizas helpoprojektojn?

La viktimoj estas unuavice misuzataj kaj trompataj civitanoj en uniformo, kiuj devas sekurigi la trezorojn de aŭtokratoj, oleobaronoj, armilkomercistoj k.a. Krome estas cinike murdigataj sendefendaj virinoj, infanoj kaj olduloj!

Kial, eĉ en Esperantujo, regas surdiga silentado? Ĉu pro honto rilate al la idealo de Zamenhof? Skribis ja Italo Calvino en sia libro “La Kosmokomikoj”: “*Homo ekmarŝas por atingi, paŝon post paŝo, la saĝon. La celon li ankoraŭ ne atingis.*”

Aliflanke: tamen, la filozofio de Zamenhof estas multe pli grava ol diversaj ege interesaj aspektoj de la esperanta, mondvasta kulturo, pli gravaj ol ekz. historio aŭ numismatiko. Tamen, al niaj legantoj ni volas fojefoje sendi ankaŭ pozitivajn mesaĝojn. Tia fenomeno estas la daŭre kreskanta, nedeviga subteno de diversaj membroj kaj eĉ ne-membroj por pliriĉigi niajn ENA-projektojn.

Ni lastatempe ricevis diversajn kontribuaĵojn, kiel bildojn, fotojn kaj priskribojn pri ĝis tiam nekonataj aŭ ne priskribitaj medaloj, i.a. el Aŭstrio, Anglujo, Brazilo, Francio, Rusio... Ni evidente ege dankas niajn volontulojn kaj esperas, ke aliaj membroj kaj legantoj kontribuos al la *kompilado de la unua, plejeble kompleta katalogo pri esperantaj numismatikaĵoj!*

Agrablan legadon!

Bert

Benjamin Celestino Camosato (1885-1964)



BENJAMIN CELESTINO CAMOSATO (foje ankaŭ skribita "Camosato") brazilano, dent-kuracisto, fondinto kaj unua prezidanto de "Societo Sankta Katarino" (1907) en Florianopolo, kaj de "Sud-Brazila Esperantistigilo" (1927) en Porto Alegre. Direktoro de la revuo "Brasil Filatélico", kiu publikigis artikolojn en kaj pri Esperanto.

En 1923 li faris dokumentfilmon en Cachoeira do Sul pri ribelo, kiu okazis en Sud-Riogrande, en tiu jaro gvidita de Getúlio Vargas. Li produktis ankaŭ la filmon "La Reĝa Ŝipo Italio en Rio Grande" (1924, 26 min 48 s), pri la alveno de tiu ŝipo, kiu vizitis sudajn landojn por propagandi la italan kulturon kaj la politikon de Musolino. La filmo montras la komandanton kaj oficirojn dum vizito al urboj de la brazila ŝtato Rio Grande do Sul, kun akcepto de aŭtoritatoj, italaj enmigrintoj kaj simpatiantoj de faŝismo. Troviĝas priskribo de la filmo, arkivigite je 2016-03-05 per la retarkivo Wayback Machine (en la portugala).

Li kunfondis en 1931 la Sudriograndan Filatelan Societon en Porto Alegre kaj redaktis la unuajn jarojn de ties eldonado, kiu same pritraktis Esperanton. Li estis poste nomumita honora membro de tiu Societo.

Fonto:

Ĉi artikolo baziĝas sur la artikolo pri Camosato en "Enciklopedio de Esperanto".

MONEROJ & MEDALOJ

Tipo C4 – Ne-Esperanto-medaloj rilate al Esperanto

Franca distingita medalo por brazila esperantista meritulo



Lando: Francio
Metalo: bronzo
Diametro: 50 mm
Jaro: 1947

Kvanto: *serĉata*
Pezo: 63 g
Medalisto: Henri Dropsy
Diko: ĉ. 3 mm

Averso:

supre: permane cizelita omaĝo, referanta al “DR BENJAMIN CAMOZATO1947”

meze: klasikeca fontano

sube: ALLIANCE FRANÇAISE

tute sube: signo, eble de la monfarejestro

Reverso:

meze: du antikvastile vestitaj barbuloj, kiuj sidas kaj legas legaĵojn sur sino kaj genuoj

tute maldekstre: vertikala surskribo: “H. DROPSY”

Rimarko 1:


B. Camosato estis brazila eminentulo kaj esperantisto, kiu havis fortajn ligojn en Francio; li studis odontologion kaj lia periodaĵo “O Brasil Philatelico” enhavis eĉ partojn en la franca

Rimarko 2:

“Alliance Française” estas asocio tre malavare financata de la oficiala estraro, por propagandi mondvaste la francajn naciajn lingvon kaj kulturon, kiel ankaŭ la germana “Goethe Instituto” kaj multaj aliaj naciaj instancoj. **Tial Esperanto kaj la esperanta kulturo evidente ne povas ne perdi la propagandan konkurson pro manko de monaj rimedoj.**

La redakcio tutkore dankas nian membron Miĥaelon Benton el Brazilo, kiu senlace kolektis kaj sendis informojn kaj ilustraĵojn por nia revuo.

“La principo de internacia helpa lingvo”



“Ofte lingvo fariĝas rimedo por unuigi diversajn naciojn kaj rasojn. Tion oni spertis precipe en la orientaj landoj. Ekzemple la egiptoj estis aparta nacio. Ankaŭ la asirianoj fondis grandan regnon. La civilizacio de la ĥaldeoj estis eminenta en la malnova kulturmondo. Unu lingvo fine superis la aliajn kaj unuigis la ĥaldeojn, asirianojn kaj egiptojn, ke ili eĉ forgesis siajn gentnomojn kaj unuigis. Hodiaŭ ili estas nomataj araboj. Kial? Ĉar la araba lingvo fariĝis reganta lingvo super la aliaj. Se ni hodiaŭ demandas egipton, al kiu nacio li apartenas, li respondas: Mi estas arabo! Same ni trovas tion ĉe la ĥaldeoj kaj asirianoj. Ili respondas: Ni estas araboj! Tio ĉi pruvas al ni, ke la lingvo estas kapabla unuigi la popolojn. La modernaj nacioj havas tre multajn malpacojn kaj konfliktojn inter si, kies kaŭzoj plej ofte devenas de malkompreno pro diverseco de lingvoj. El tio naskiĝis la ideo de la internacia lingvo. Tiu ĉi efikus pli forte ol patriotismo aŭ rasa sento. Bahá'u'lláh, kiu aperis en la Oriento, deklaris, ke estas necese serĉi unuecan lingvon, por ke tiu ĉi internacia helplingvo fariĝu la plej forta kunligilo


inter la diversaj nacioj, forigonte la malkomprenojn inter la popoloj. ... Tial estas la plej bona solvo, fondi helplingvon, uzeblan por ĉiuj popoloj. D-ro Zamenhof estas la fondinto de tia lingvo. Kiam nun tiu ĉi lingvo estus instruata en ĉiuj publikaj lernejoj de la mondo, tiam la popoloj atingus la superan kulturstaton, tiam ĉiu devas lerni nur du lingvojn, la gepatran lingvon kaj la internacian lingvon. Se estas por provizi kompletan interkomprenon inter la popoloj, universala helpa lingvo estos adoptata kaj en la lernejoj de la estonto du lingvoj estos instruataj – la gepatra lingvo kaj tiu ĉi internacia helpa lingvo, kiu estos aŭ unu el la ekzistantaj lingvoj aŭ nova lingvo konstruita el vortoj de ĉiuj lingvoj – la afero estos decidata far koncilio renkontiĝanta por tiu celo kaj reprezentanta ĉiujn tribojn kaj naciojn. ‘Abdu'l-Bahá Bahá'u'lláh priskribas la adopton de universalaj lingvo kaj skribo. Liaj skriboj antaŭvidas du ŝtupojn en tiu procezo. La unua ŝtupo konsistas en la elekto de ekzistanta aŭ inventita lingvo, kiu tiam estos instruata en ĉiuj lernejoj de la mondo kiel dua (helpa) lingvo apud la gepatraj lingvoj. La registaroj de la mondo pere de siaj parlamentoj estas alvokataj efektivigi tiun ĉi gravegan leĝon. La dua ŝtupo, en la dista futuro, estos la fina adopto de unu sola lingvo kaj komuna skribo por ĉiuj surtere. La Universala Domo de Justeco disvastigite de la helplingvo tra la tuta mondo, malaperigos multe da malkomprenoj, ĉar malkomprenoj, kiel jam dirite, kaŭzas la plej fortan malbonon, kaj la kaŭzo de ĉiuj tiuj malkomprenoj ja estas manko de tia lingvo. ... Do, internacia helplingvo estas certe la fundamento por la kunligo de la popoloj kaj granda potenco por unuigi la religiojn. En la Oriento estas multaj hebreoj, kristanoj kaj mahometanoj. Sed ĝis nun ne intermilitis la kristanaj araboj kaj mahometanaj araboj, ĉar ili povis interkompreniĝi; ili povas interŝanĝi reciproke siajn pensojn. Sed ĉiam interbatalis turkoj, bulgaroj kaj grekoj, ĉar ili neniam povis atingi la fundamenton de komuna lingvo. Tiuj ĉi estas ekzemploj, certaj pruvoj, ke internacia helplingvo unuigos la homaron. ... Kiel bela kaj mirinda estus interkompreniĝo per unu lingvo. Tiam la Oriento kaj Okcidento povus unuigi kaj ni estus kvazaŭ kiel unu nacio. Tial ni ĉiuj propagandu Esperanton, por ke venu granda amikeco inter la homoj. ... Ĉiu entrepreno celanta la unuigon de l' homaro estas dia. Tial ni povas certigi, ke la efikoj de l' universala helplingvo estas diaj, se ni konsideras ĝiajn rezultojn. Ni devas labori kaj klopodi, ke tiu ĉi lingvo fariĝu parto de la instruado en ĉiuj publikaj lernejoj. Estas absoluta devo de ĉiu nuntempo, ke li akcelu la ellernadon de la ĝenerala helplingvo. Ĉar tiu lingvo estos la rimedo por altigi la signon de l' paco kaj de l' frateco inter ĉiuj.”

‘Abdu'l-Bahá

Fonto: “Bahaismo kaj Esperanto” Bahaa Esperanto-Ligo, 2009

Tipo C4 – Ne-Esperanto-medaloj rilate al Esperanto

Plaketo honore al Abdul Baha (1844 - 1921)



Lando: Usono

Kvanto: ĉ. 500

Metalo: bronzo

Pezo: 141 g

Mezuroj: 76 x 51mm

Medalisto: Louis M. Potter

Jaro: 1912

Diko: *serĉata*

Averso:

busto de Abdul Baha, en profilo kaj maldekstren, antaŭ orienta arko aŭ niĉo.

supre-maldekstre: “Louis Potter”

tute sube en la angla: “ABDUL BAHA PERSA REFORMANTO APOSTOLO DE PACO
OMÂGE DE LA C F M MCMXII”

C F M = Circle of Friends of the Medallion

Reverso:

staranta virino kun disetenditaj brakoj kiel simbolo de invito al la homaro unuiĝi; olivbranĉo en la dekstra mano kiel simbolo de paco; arko aŭ niĉo kiel simbolo de sanktejo.

Sube en la angla: AMO PACO UNUO

Rimarko 1:

Jen kelkaj bildoj de arĝenta, tute samaspekta plaketo.



Rimarko 2:

Ekzistas krome bronzaĵaj variantoj kun stiligita “surteksteto”, maldekstre - supre, en orienta lingvo (eble en la araba-persa = Farsi). Baha naskiĝis ja en la irana ĉefurbo Teherano.

La “emblemo” maldekstre-supre estas stiligita kaligrafio, artista esprimo de devota epigrafo honore al “Yā Bahá ‘u I-Abhá (= Ho Gloro de la Altega Gloro), la fondinto de la Bahá-religio. La dezajno estis kreita en la 19a jarcento de la kaligrafisto Mishkin-Qaham kaj poste vaste uzata en bahaismo.



Tipo D 2 – Plaketoj kaj medalonoj

Diversaj aplikoj de la sama medalo



Lando: Francio

Metalo: bronzo

Diametro: 118 mm

Jaro: ĉ. 1920



Kvanto: *serĉata*

Pezo: *serĉata*

Medalisto: Raoul Eugène Lamourdedieu

Diko: 4 mm

Averso:

samaspekta busto de LLZ kiel sur multe malpli granda, duflanka medalo, priskribita en *jarkolekto 1, n-ro 1, p. 8 /Vidu ankaŭ jk. 2, n-ro 3 p. 16* Tamen sur ĉi plaketo la nura surskribo estas “D-ro ZAMENHOF”. La subskribo de la medalisto (li foje, sed ne ĉi-okaze, uzis ankaŭ la nomon “F. MAGDELAINÉ) troviĝas maldekstre, vertikale en kvazaŭa manskriba stilo.

Reverso:

senbilda, ne surskribita flanko, kun klaraj spuroj de iama fiksado sur iu ajn “monumento”

Rimarko 1:

Pri la medalisto, vidu *jk. 10, n-ro 3 pp. 17-18*

Rimarko 2:

Ne jam estas certe sciite, kiu el ambaŭ ekzistis antaŭ la alia, ĉu la medalo aŭ la plaketo

Rimarko 3:



bildoj de la kompleta, aŭtentika medalo

Tipo C6 – Ordenaspektaj medaloj

6^a Beneluksa Kongreso Haarlem 1959



Lando: Nederlando

Kvanto: *serĉata*

Materialo: kartono

Pezo: 2 g

Dimensioj: 7,5 x7,5 x7,5 cm

Dezajnisto: *serĉata*

Jaro: 1959

Diko: *serĉata*

Averso:

ĉirkaŭe: tri trianguloj verdaj, kvazaŭ ordigitaj kiel dudimensiaj rusaj matroŝkoj

meze-supre: Esperanto-steleto kun kvin radioj

meze-centre: preĝejo en la urbo Haarlem

meze- sube: “6a Beneluksa Kongreso Haarlem - Pentekosto 1959”

Rimarko:


Benelukso: regiona, interregistara kaj kooperata unio de Belgio, Luksemburgo kaj Nederlando

ASPEKTOJ DE NUMISMATIKO

Mondvastaj iamaj monerpeziloj (1)



Araba vitra monerpezilo de la jaro 743



Monerpesilujo el 1581

Monerpeziloj estis uzataj por pesi unuopajn orajn (kaj kelkfoje arĝentajn) monerojn. Ili estis faritaj el latuno kaj kelkfoje el bronzo aŭ plumbo. La peziloj estis stampitaj sur la averso per simpligita bildo (karakteriza trajto) de la monero, kiun ili reprezentis; tio nomiĝas la "bloka bildo". *Maldekstre: monerpezilujo el 1581*, unu el la plej fruaj pluvivaj monerpeziluloj el la 16-a jarcento. Ĉi tiu ekzemplero estis kunmetita en 1581 de Nicolaes du Mont en Antverpeno kaj plenigita per liaj monerpeziloj, datitaj en 1580. Ili mem estis farataj el latuno. La skatolo enhavas 36 monerpezilojn, por tiom da diversaj oraj moneroj, kiuj cirkulis tiutempe: de malpezaj moneroj de ĉirkaŭ 1,52 g (1/2 Filipa-guldeno) kaj inkluzive de la monstre granda 10 Cruzado de 35,36 g (la "Portugaloser"). La etiketoj apud la fakoj estis metitaj transverse kaj super ĉiu monerpezilo, tiel ke la intenco estis, ke la skatolo estu rotaciita kvaronturne dum uzado: peziloj maldekstre, dum la monero estis manipolata dekstre. La ora monero estis metita sur la platan triangulan pleton, la monerpezilo en la malprofundan rondan pleton. Sub la glitŝildo (datita en 1581 ĉi tie) kuŝas malgrandaj platformaj peziloj, la tiel nomataj "aasjes" [aŝes]. Ĉi tiuj povus esti uzataj por determini, kiom malpli pezas monero. Iomete malpli peza estis permesita, kontraŭ rabato de la prezo de la monero. Por la foto, la pezo (en ĉi tiu kazo trumpetpezilo) estis forigita el la pezofako kaj metita sur la malfermitan kovrilon *Dekstre: Zelando monerpezilo-skatolo el 1622*. La kontraŭa bildo montras la maldekstran parton de monerpezila skatolo, farita en Middelburg en 1622. La skatolo estis uzata vertikale; la apudskriboj estis skribitaj super la kadroj. La monerpeziloj kuŝas en la ĝustaj kadroj, ĉar ili kongruas kun la apudskriboj. Ĉi tiuj apudskriboj indikis la nominalan valoron de la monero, kiel ekzemple tuta, duono, kvarono ktp. Ekzemple, la 'Henricus' (maldekstre, tria de supre) por la Nobelo de Anglio; dekstre de tio, la '1/2 Henricus' por la 1/2 Nobelo. Tiel nomataj bankpeziloj estis uzataj por pesi arojn da moneroj; kiam 'granda mono' ankoraŭ estis monfarita en formo de arĝentaj kaj oraj moneroj, ĉi tiuj moneroj laŭvorte 'valoris sian pezon en oro' (aŭ arĝento). Ĉi tiuj moneroj tial estis akceptitaj kiel pagrimedo, nur se ili ne estis tro eluzitaj kaj ne estis intence malpezigitaj (la tiel nomata 'pritondado' de la moneroj). Ekde la mezo de la



Zelando1622

dek-tria jarcento, oraj moneroj revenis post longa tempo en cirkuladon en Okcidenta Eŭropo, komencante per 'fiorino' aŭ floreno el Italio. Bone akceptitaj moneroj poste estis falsigataj en aliaj urboj kaj regionoj. Aldone al fiorino, amaso da oraj kaj (grandaj) arĝentaj moneroj venis post longa tempo en cirkuladon, kiuj foje estis akceptataj kiel pagrimedo multe pli fore ol ilia loko de monfarado. Por kontroli tion, oni uzis tiel nomatajn monerpezilujojn de la 14-a ĝis la komenco de la 19-a jarcento: malgrandaj skatoloj enhavantaj malgrandan pesilon, monerpezilojn por la diversaj moneroj en cirkulado, kaj, ekde (ankoraŭ nekonata) momento, aron da peziloj uzataj por determini la subpezon de la monero. Se la monero estis iomete subpeza, krompago devis esti pagita al la persono akceptanta ĝin. Se la subpezo estis pli granda, la monero estis rifuzita kiel pagrimedo kaj devis esti transdonita al la interŝanĝistoj, post kio pago estis farita surbaze de la propra valoro (= la metalvalor). La akceptitaj moneroj estis duonigitaj kaj fine metitaj en la krisolon.



Kaj grekoj kaj romianoj havis ŝtonajn pezilojn por ĝenerala uzo, kiuj ankaŭ estis uzataj por pesi monerojn. La plej malnovaj peziloj, pri kiuj ni certe scias, ke ili estis faritaj specife por pesi monerojn, estas kvarflankaj aŭ rondaj bronzaĵoj el la Bizanca Imperio por pesi la oran soliduson enkondukitan sub Konstanteno la Granda (307-337), la tiel nomatajn "exagia solidi" (singulara exagium, de exigere = testi, kalibri, alĝustigi). Unu flanko kutime prezentas la imperiestron (solan aŭ kune kun liaj kunregantoj), foje monogramon aŭ kombinaĵon de literoj; la alia flanko havas, interalie, monogramon, la "Moneta", pezilon, la tekstojn AVGGG aŭ EXAGIVM SOLIDI ktp. Foje bildoj kaj literoj estis inkrustataj en arĝento en la bronzan pezilon. Kiam la soliduso komencis malpeziĝi ĉirkaŭ 960 kaj estis iom post iom anstataŭigita per aliaj specoj de moneroj, maso kaj bildoj estis adaptataj al la nova situacio. Ekzistas ankaŭ pli simplaj bronzaĵoj kun gravurita monervaloro. En certaj partoj de la Bizanca Imperio, kiel ekzemple Egiptujo, Libano kaj Palestino, rondaj peziloj estis faritaj el pli malmultekosta vitro, en kiuj bildo estis aplikata nur je unu flanko: monogramo, unu, du aŭ tri imperiaĵoj, ktp. Pli simplaj estas la rondaj vitraj arabaj peziloj por pesi la oran dinaron kaj la arĝentan dirhamon, kiuj ekuziĝis ĉirkaŭ la jaro 700. La unuflanka bildo kun teksto rilatas al la nomo de la kalifo, havas religian signifon kaj/aŭ rilatas al la masoj. La produktado de ĉi tiuj peziloj ĉesis ĉirkaŭ 1350. Aldone al la vitraj peziloj, bronzaĵoj arabaj bankpeziloj ankaŭ ekuziĝis en la 11-a jarcento por pesi pli grandajn kvantojn da moneroj, ĉar vitraj peziloj estis malpli taŭgaj por tiu celo. Tiuj bankpeziloj havas tre diversajn formojn. La plej malnovaj okcidenteŭropaj monerpeziloj, kies surskriboj komence indikas arabajn influojn, devenas de Hispanio. Tamen, ilia produktado havis negravan signifon. En Italio, post la enkonduko de oraj guldenoj en 1252, ekestis la bezono kontroli ilin. Rondaj, bronzaĵoj kun bildoj, rilataj al la moneroj, estis komence produktitaj en Milano kaj Venecio (ankaŭ tie okangulaĵoj), kaj ekde 1700 ankaŭ en la Papa Ŝtato. Rektangulaj peziloj estis produktataj en Torino ekde ĉirkaŭ 1750.




Daŭrigota

VALORMARKOJ & VALORBILETOJ

Parte restanta biletaro varbila kun kvitancoj
por jarabono de la monata gazeto "MONDO"

<p>ELDONEJO MONDO SPRL Bredabaan 280 — Brasschaat</p> <p>MONDO Monata gazeto por la diskonigo de la Internacia Lingvo Esperanto</p> <p>ABONO N^o 3461</p> <p>Nomo : Antaŭnomoj : Strato : N^o Loko : Dato :</p>	<p>ELDONEJO MONDO SPRL Bredabaan 280 — Brasschaat</p> <p>MONDO Monata gazeto por la diskonigo de la Internacia Lingvo Esperanto</p> <p>ABONO N^o 3461</p> <p>RICEVITA de S strato, N^o, en la sumon de 25 Frankoj por jarabono 1956/1957 al la monata gazeto MONDO., la 19.....</p>
---	---

Numeritaj ekde 3461 ĝis 3479 (do ne komplete)



Instrukciaro por varbuloj de la revuo "Mondo", interne de la antaŭa kovrilo de la biletaro

MEDALISTOJ

La famega familio Fattorini kaj Esperanto!

					
Antonio Fattorini 1797-1859	Innocent Fattorini 1830-1874	Thomas Fattorini 1864-1934	Wilfred Fattorini 1903-1992	Thomas Fattorini 1932-2010	Thomas Fattorini 1960

Historio de la gento Fattorini, juvelistoj, oraĵistoj kaj arĝentaĵistoj

La firmao de la familio estis fondita en 1827 de Antonio Fattorini (1797-1860). Ĉi tiu rimarkinda kompanio ankoraŭ funkcias hodiaŭ.

En 1829 la firmao estis listigita kiel "juvelisto" en norda Anglio. La preciza loko estis 18 Bazar, Central Market, Leeds, Yorkshire. Ĉi tiu kompanio de juvelistoj ankaŭ posedis podetalajn ejojn.

En 1831 Antonio Fattorini malfermis butikon en la luksa kuracloko Harrogate en la Okcidenta Rajdado de Yorkshire. Li ankaŭ komercis de granda ejo ĉe 28 Kirkgate, Bradford en la sama graflando. De tie la firmao ekkomercis sub la nomo "Fattorini & Sons".

Ilia reklama slogano "Fattorini & Sons, oraĵistoj, Skipton, Harrogate kaj Bradford" resumis ilian atingon en Yorkshire.

FATTORINI & FILOJ LTD: PRODUKTANTOJ POR LA ADMIRALITATO KAJ LA
OFICEJO DE LIA REĜA MOŜTO EN HINDIO

Estas tiom da membroj de la familio Fattorini, kiuj partoprenis en la entrepreno, ke ilia afiŝo nur ofertas mallongan superrigardon.

La entrepreno en Skipton estis malfermita en 1848 de Innocent Fattorini. Innocent edziĝis al la filino de Baldassarre Porri, kiu ankaŭ estis juvelisto. Kiam Innocent mortis, lia edzino daŭre administris la entreprenon. Ilia filo, Thomas, daŭrigis la komercon uzante sian propran

nomon. En 1903, Thomas malfermis alian filion en Bolton, Lancashire. Li gvidis la kompanion por iĝi entrepreno kun limigita respondeco en 1919, komercante sub la nomo Thomas Fattorini (Lancashire) Ltd. La filio en Skipton ankaŭ fariĝis kompanio kun limigita respondeco. Post lia morto en 1934, lia filo, Wilfred, daŭre administris la entreprenon.

La filio en Harrogate (14 Regent Parade) estis administrata de Antonio Fattorini la 2-a. Je la morto de Antonio la 2-a, lia fratino, Maria Tindall, ŝia filo Johano kaj nevo Edward H. Tindall estris ĉi tiun entreprenon. Ĉi tiu estis tiel sukcesa branĉo, ke la pranepoj de Maria, Karlo kaj Antonio Tindall, ankaŭ aliĝis al la firmao.

La grandajn Bradford-ajn konstruaĵojn estris John kaj Edward Fattorini.

Alia firmao Fattorini aktivis en la mezo de Anglio, situanta ĉe 30 Spencer Street kaj registrita kiel Frank Fattorini & Filo. Francis (Frank) estris ĉi tiun branĉon. Li estis la nepo de Frank, kiu estis filo de la fondinto. La firmao patentis multajn malsamajn dezajnojn, inkluzive de horloĝoj.

En 1915 la kvin partneroj aĉetis la Birmingham-bazitan firmaon, la medalfabrikan firmaon Joseph Moore, ĉe 13 Pitsford Street. Ankaŭ ĉi tiu fariĝis kompanio kun limigita respondeco nomita Joseph Moore Ltd kaj en 1958 ĝi estis renomita Fattorini & Sons Ltd de 36 Barr Street, Birmingham.

La reklamiloj montritaj sur la antaŭa paĝo rilatas al la malfermo de la Trafalgar Works, Birmingham en 1926/1927, kie ĝi ankoraŭ troviĝas nuntempe.

Ege sukcesa firmao sendube!



POR SPUREMULOJ!

En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj kaj bildoj de esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni provizore scias preskaŭ nenion!.

47a enigmo



Ni serĉas la dimensiojn! (vidu ekzemplojn ĉe “Moneroj & medaloj”!)

48a enigmo

El zamenhofa letero

“Mi tre petas Vin, akceptu en la programon de la kongreso ne ian punkton, kiu havas ian rilaton al mia persono. Mi tre volas, ke la kongresanoj vidu en mi ne la aŭtoron de Esperanto, sed nur simplan esperantiston... La aŭtoro de Esperanto en la kongreso devas esti rigardata kiel mortinta kaj neekzistanta; por la kongreso devas ekzisti nur la afero. Neniam kaj nenie devas esti elparolata la vorto ‘majstro’ *ktp.* Mi skribos pri tio ĉi specialan artikolon, en kiu mi sciigos ĉiujn esperantistojn, ke mi povas veni al la kongreso nur kun tia kondiĉo. Mi prezidos en la kongreso ne kiel aŭtoro, sed nur kiel ‘la plej kompetenta esperantisto’.

Sur la memoraĵa medalo, kiun Vi intencas pretigi, volu doni ne mian portreton, sed nur ian emblemon de Esperanto; mia nomo ne devas sin trovi sur tiu ĉi medalo. (El letero de LLZ al Michaux, marton 1905)


[La redakcio serĉas klarigojn pri “Sur la la memoraĵa medalo, kiun Vi intencas pretigi...” kaj pri “Mi skribos pri tio ĉi specialan artikolon...”](#)

DANKON ANTICIPE!!!

SPIKUMAĴOJ & SUPLEMENTOJ

Propaganda afiŝo pri la centjariĝa jubilea medalo

JUBILEA MEDALO DE ZAMENHOF



Omaĝe al Zamenhof Pola Esperanto-Asocio eldonis medalon dediĉitan al la centjara datreveno de lia naskiĝo.

Aŭtoro de la medalo estas la elstara pola skulptisto J. Gosławski. La medalo havas diametron de 70 mm. Sur unu flanko troviĝas portreto de Zamenhof kun surskribo „Ludoviko Zamenhof — aŭtoro de Esperanto — 1859 — 1917”. Sur la alia — ni legas jenan tekston: „Omaĝe al Zamenhof en la centjara datreveno de la naskiĝo — Varsovio — MCMLIX”. La medalo prezentas memoran kaj artan valoron. Ĉiu esperantisto havu ĝin kiel memorajon pri la centjara datreveno de Zamenhof. Ĝi ornamas ĉies skribotablon.

La medalo aperis en du specoj: bronza kaj arĝenta. La bronza kun skatolo kostas 5 dolarojn, la arĝenta — kun la sama skatolo kostas 6 dolarojn. Oni povas ankaŭ aĉeti medalojn sen skatoloj. Tiam la respektivaj prezoj estas 4 kaj 5 dolarojn.

La perantoj, kiuj mendas minimume dek pecojn, ricevas rabaton de 20%.

Mendojn bonvolu direkti al: Pola Esperanto-Asocio, Warszawa, Nowy Świat 27, Pollando.

Vidu ankaŭ: *jk 5, n-ro 4, p. 7*

HISTORIAJ ASPEKTOJ

1. Kiam numismatiko fariĝis scienco?

Renesanco markas gravan fazon en en la rakonto pri numismatiko. En 1515, la humanisto Guillaume Budé publikigis du verkojn pri antikvaj romiaj moneroj. Ĉi tiuj libroj, kiuj perfekte ilustras, kiom interesitaj akademiuloj tiutempe estis pri ĉio rilata al la romia antikveco, ofertas novan perspektivon pri moneroj. Moneroj kaj medaloj jam ne estas nur objektoj de komerco, sed veraj historiaj kaj sociologiaj atestoj de sia tempo. Diversaj surskriboj, simboloj, desegnaĵoj, vizaĝoj aŭ eĉ literoj... ĉiu peco rakontas okazaĵon, historion.

Ĝis la 17-a jarcento, ĉi tiuj verkoj funkciis kiel referenca materialo por ĉiuj historiistoj kaj esploristoj tra la mondo, kiuj volis pli bone kompreni la pasintecon. Joseph Hilarius Eckhel, aŭstra pastro, verkis inter 1737 kaj 1798, “**Doctrina numorum veterum**”. La unua kompleta traktaĵo (en 8 + 1 volumoj) pri numismatiko, en kiu li plene traktas la klasifikon de moneroj kaj medaloj: laŭ lando kaj urbo, kie ili estis monfaritaj, la uzitaj materialoj, la simboloj aperantaj sur ili... Ĉiu detalo estas precize priskribita kaj analizita, ebligante tre precizan bildon pri la historio de kulturoj. Ĉi tiu libro ankoraŭ haveblas kaj estas ***biblio por ĉiu numismato.***

Ekde tiu dato, multaj numismataj revuoj estis publikigitaj. Kio ĝis tiam estis scienco rezervita por akademiuloj fariĝis populara kaj certigis, ke moneroj kaj la rilataj riĉaĵoj atingu la plej vastan eblan publikon.

Same kiel la historiistoj kaj humanistoj de Renesanco, multaj nobeloj, riĉaj sinjoroj kaj pastroj interesiĝis pri la arto de la grek-romia antikveco kaj iliaj moneroj. Estis dum ĉi tiu tempo, ke aperis la unuaj kolektantoj de antikvaj moneroj, kiel ekzemple la Mediĉoj en Italio.

Nur komence de la 19-a jarcento, kun la apero de la unuaj numismataj revuoj, numismatiko fariĝis pli demokratia. Ĉar tio koncernas ne nur malnovajn kaj tial multekostajn monerojn, sed ankaŭ pli modernajn monerojn de diversaj originoj kaj tial pli pageblaj. Numismatoj troveblas tra la tuta mondo kaj en ĉiuj sociaj tavoloj de la loĝantaro. Kaj iliaj motivoj estas ankaŭ tre diversaj. Iuj homoj kolektas monerojn, ĵetonojn aŭ medalojn pro estetikaj kialoj. Aliaj fokusiĝas al lando, metalo aŭ alojo, al epoko, kiun ili ŝatas, aŭ al temo de reprezentado. Ankoraŭ aliaj preferas pecojn kun simboloj, famaj homoj aŭ bestoj.

Ĉiu numismato taksas sian monerkolekton. Sentimenta valoro, sed ankaŭ numisma valoro (aŭ kolekta valoro), tio estas, ligita al la maloftaĵo de la pecoj. Limigita monfarado, stato de la monero, dato de ĝia monfarado... Multaj faktoroj povas influi la prezon kaj sekve la valoron de monero. En ĉi tiu kazo, la tipo de metalo (oro, plateno, paladio aŭ alojo) kaj la kvanto de metalo uzata por la produktado de la monero ludas neniun rolon. Ĝuste ĉi tiuj elementoj tamen interesas investantojn.

Fonto: *Google www.goldmarket.fr*

* * * * *

2. Kiel komenci propran numismatikan kolekton?

Du revenantaj demandoj aperas, kiam oni diskutas pri numismatiko... ĉu demandataj de scivolemuloj aŭ pli informitaj personoj: kiel kaj kial komenci numismatikan kolekton? Ĉu ĝi devas esti multekosta?



Ekzistas tiom da kolektoj, kiom da manieroj kolekti; tio validas por ĉiuj kampoj, kaj numismatiko ne estas escepto. Numismatiko estas dividita en milojn da specialigitaj areoj (disvastigitaj tra 2500 jaroj da monda historio), kaj estas tre malfacile tuj scii, kiu areo plej allogas vin, kiu areo donos al vi la plej grandan plezuron, kaj kiu nutros vian scivolemon.

Multaj homoj komencas kolekton, ĉar malnova skatolo aperas en tirkesto, malhela kelo aŭ polvokovrita subtegmento, kiu, unuarigarde, ŝajnas esti trezoro... La unuaj demandoj ofte estas: "Kio ĝi estas? Vi ĵus akiris tion, kio restis en la monujo de via avo... kiun ĉiuj forgesis!... kaj tiel vi remalfermis malgrandan fenestron al historio."

Se oni decidis konservi ilin, por restarigi ilian rajtan lokon en numismatiko, la logika sekva paŝo estas ekscii, kio ili estas. Jen la ŝlosilo al sukceso: kompreni la faktojn ĝuste. Se vi komencas "senkonscie", sen scii, kien vi iras, tio estas la plej bona maniero fari eraron kaj rapide rezigni pro frustrigo.

Sciante, kion vi havas, oni devas konsulti ĝin, kio povas esti farita diversmaniere: vizitante profesionan numismaton (rete aŭ persone por demandi), serĉante numismatikan literaturon, aĉetante aŭ konsultante en biblioteko. Depende de ĉu via esplorado malkaŝas, ke viaj moneroj estas efektive historie interesaj, sed ne maloftaj aŭ multekostaj, aŭ inverse, ke vi trovis la monerojn, kiuj estis ŝtelitaj de la Biblioteko Nacia en 1831 kaj supozeble fanditaj, la konsekvencoj por la estonteco de via estonta kolekto estos tre malsamaj.



Se viaj moneroj, kiel preskaŭ ĉiam okazas, ne havas altan merkatan valoron, vi nun scias, kie ili troviĝas en la historio kaj povas identigi siajn kuzojn.

Tio ankaŭ ebligas al vi eltrovi, kio al vi mankas por, ekzemple, havi unu moneron de ĉiu tipo el ĉiu periodo. Se vi ne serĉas esceptajn pecojn aŭ maloftajn variaĵojn, vi povas, kontraŭ akceptebla buĝeto, meti sur grandan tablon ĉion, kion niaj rektaj prapatroj havis en siaj poŝoj, kasregistriroj kaj aliaj monujoj, de la Revolucio ĝis la transiro al eŭro... tio estas historio de ĉirkaŭ 220 jaroj.

Sed malfacilas scii komence, kio ekscitos vin, kio vekos vian scivolemon, kaj de antikveco ĝis nia nuna historio, la areoj povas esti tre diversaj kaj kovri senfinan nombron da periodoj kaj eblecoj. La moneroj, kiujn vi posedas, trovis ion specialan... Konsultu librojn, rigardu, rigardu atente; parolu kun spertaj aŭ profesiaj numismatoj, el kiuj kelkaj parolos al vi pli ol aliaj kaj

donos al vi indikojn. Demandu ilin kion ili kolektas persone, aŭ eĉ "kiel" ili kolektas. Pripensu viajn personajn devenas, vian laboron, vian signifas ion por vi, aŭ kiujn vi kaj aperos pasio por kolektado. devas scii, kio estas ĉi tiuj kio estas ofta kaj kio estas multan legadon. Ofte estas moneroj en la domo de



spertojn, la regionon, el kiu vi familion, la historiajn lokojn, kiuj amas... kaj aferoj nature formiĝos Alia esenca punkto estas, ke vi moneroj, kio ekzistas kaj kio ne, escepta. Tio postulas diskuton kaj tiom (aŭ pli) da libroj kiom da numismato.

Por moderna franca moneraro, libro kiel *"Le Franc, les monnaies, les archives"* kovras la tutan modernan periodon de la franko, de la transiro al la dekuma sistemo dum la Revolucio ĝis la transiro al eŭro, kaj povas efike gvidi kaj informi vin. Ekzistas sennombraj libroj pri preskaŭ ĉiuj specoj de moneroj, kaj vendokatalogoj ankaŭ estas fonto de informoj.

Neniam pensu, ke aĉeti libron anstataŭ moneron estas eraro. Tre ofte, ĝi estas tio, kio ebligas al vi trafi la najlon sur la kapon "la venontan fojon"!!!

Post kiam la komenco de kolekto estas kreita, la longa vojo komenciĝas. Rigardu viajn monerojn denove kaj denove, komparu ilin kun tio, kion vi povas trovi. Nuntempe, la interreto estas fenestro al grandega minejo da informoj. Iru al profesiaj numismatoj por ekscii ĉu tio, kio vin interesas, estas facile trovebla aŭ ne (la fakto, ke iuj moneroj estas malmultekostaj, ne signifas, ke ili estas facile troveblaj). Kvankam la tento estas granda, certigu, ke vi ne aĉetas ion multekostan dum kelkaj monatoj!

Rigardu ĉirkaŭe, komparu, ekzameni ĉion zorge antaŭ ol fari decidon, kiun vi eble rapide bedaŭros poste...



TERMINARO

Alfabeto listo (45)

aĉetanto-premio: - aŭkciaj kostoj, kiuj kutime kiel procento de la prezo estas aldonataj al la prezo de la objekto

- pozitiva diferenco inter la nominala valoro kaj la eldonprezo de la produktanto

altvalora metalo: tre stabila metalo, kiu ne facile korodas. Ofte uzataj estas oro kaj arĝento. Plateno malofte, ĉar malfacile fabrikebla.

brasaĵo: salajro de mentomajstro

busto: portreto kun ŝultroj

detranĉo: malsupra parto de flanko apartigita per horizontala lineo. Ofte uzata dum jaro.

diametro: dimensio de la sekco de monero, tre ofte indikita en milimetroj

enhavo: la relativa proporcio de la plej ofta (valora) metalo. Orenhavo estas esprimata en karatoj; 24 karatoj estas 100 %. Arĝenta enhavo estas kutime esprimata per milo. Ekzemple, 925/1000 arĝento (= sterlinga arĝento). Puraj oro kaj arĝento estas preskaŭ neekzistantaj, ĉar tro molaj por moneroj. Por aliaj metaloj oni kutime uzas tutajn procentojn.

escisto: mentoficiro, kiu kontrolas la gradon de la metalo kaj de la monero. Kutime nomumita de la mentomajstro.

fandado: produktado de moneroj ĉe monfarejo > monfarado

ĝisdatigita: provo revivigi eluzitajn partojn, ekzemple per regravuro de detaloj

kondiĉo: la stato de konservado de numismatika objekto, do maniero por indiki, kiom multe ĝi estas eluzita

martelita: stampita per martelo

nomado: nominala valoro kiel deklarita sur la monero

pagĵetono: ĵetono kun limigita pagocelo, kutime por enmeto en maŝinon

pantografo: desegna mekanismo, servanta por pligrandigi desegnaĵon laŭ la dezirata proporcio, ankaŭ uzata por prepari monerojn kaj medalojn

peltro: aloj de stano kaj plumbo, termino por kvazaŭa stana objekto pro la identika aspekto de veraj stanaĵoj

torko: metala kolringo, uzita kiel pagilo antaŭ la ekiĝo de vera mono

NUMISMATIKA FORUMO

Oro pro nobis! (2)

D. La ora bovido



La fido al romiaj moneroj iam estis tiel granda, ke eĉ ekster la Imperio, homoj volontege akceptis pagi per dinaroj. En la unua jarcento de nia erao romiaj moneroj estis akceptindaj kiel pagiloj sur la merkatoj de Hindujo, malgraŭ la grandega distanco ĝis la tendaro de la unua romia legio. La Hindianoj tiel multe fidis dinaron kaj la bildon de la imperiestro, ke lokaj regantoj, kiuj mem jam estis stampigitaj monerojn, emisiigis ekzakte tiajn dinarojn, eĉ la bildon de la imperiestro. Tiel la termino “denaro” iĝis komuna nomo por moneroj diversspecaj. Islamaj kalifoj arabigis la terminon kaj cirkuligis t.n. “dinar”-ojn. Eĉ la aktuala Jordanio daŭre uzas la saman terminon, kiel Irako, Serbio, Nord-Makedonio, Tunizio kaj diversaj aliaj modernaj ŝtatoj.

En la epoko kiam lidiecaj monsystemoj disvastiĝis de la Mediteraneo ĝis la India Oceano. Ĉinio kreis alian moneran sistemon, bazatan sur bronzaĵoj kaj senmarkaj arĝentaj kaj oraj brikoj. Tamen la du valutoj havis sufiĉe da komunaj trajtoj (nome la fido al oro kaj arĝento), kiuj helpis por formi solidajn kompaniojn financajn kaj komercajn inter la ĉina kaj la lidia influferoj. Islamaj kaj eŭropaj komercistoj kaj konkerantoj disvastigis kaj la lidian monsystemon kaj la “evangelion” pri oro al la plej malproksimaj terfinaĵoj de la tiam konata mondo. Poste kaj sekve la tuta tero iĝis granda mona zono, unuavice surbaze de oro kaj arĝento, sekve surbaze de kelkaj fidindaj valutoj kiel la brita pundo kaj la usona dolaro.

La realigo de komuna transnacia kaj transkultura mona zono kreis la bazon por la unuigo de Afriko-Eŭrazio kaj sekve de la tuta globo, kiu tiel iĝis grandega ekonomia kaj politika

teritorio. Dume homoj daŭrigis paroli lingvojn reciproke nekompreneblajn, submetiĝi al diversaj reĝoj, honori diversajn diojn, sed ... ilia komuna, ĉiutaga kredo koncerne oron kaj arĝenton, orajn kaj arĝentajn monerojn ne ŝanĝis.

Sen tiu komuna kredo, mondaj komercaj retaĵoj estintus preskaŭ maleblaj. La oro kaj la arĝento, kiujn ŝteladis la sesjarcentaj “konkvistadoroj” en Ameriko, ebligis al eŭropaj komercistoj aĉeti en Orienta Azio silkon, porcelanon kaj spicaĵojn, per kiuj ili ekfunkciigis la mekanismon de la ekonomia kreskado kaj en Eŭropo kaj en Orienta Azio. La oro kaj la arĝento rabitaj en Meksiko kaj en la Andoj grandparte forglitis tra la fingroj de la eŭropanoj kaj estis bonvenigitaj en la monuoj de ĉinaj silko- kaj porcelanfabrikantoj. Kia estintus la fato de la monda ekonomio, se la ĉinoj estus rifuzintaj akcepti la noblajn metalojn kiel pagilojn?

Nu, kial ĉinoj, hindianoj, islamanoj kaj hispanoj – kiuj havis ege malsamajn kulturojn, kaj kiuj pri preskaŭ nenio samopiniis – tamen senkondiĉe samopiniis pri la fido al oro? Kial ne nur la hispanoj fidis al oro, la islamanoj al hordeo, la hindianoj al konkoj kaj la ĉinoj al silko? Ekonomiistoj scias la respondon! Kiam du regionoj fikse estas ligitaj per negoco, ofertado kaj mendado kaŭzas oftege ekvilibron pri la prezoj de transporteblaj varoj. Por kompreni tion, ni observu hipotetan kazon. Imagu, ke komenciĝis negoco inter Hindujo kaj la Mediteranea Regiono, sed la hindianoj ne interesiĝus pri oro, tial ke tiu metalo tie estus preskaŭ senvalora. Aliflanke, en la alia teritorio oro estus multvalora statusa simbolo. Kio sekve povus okazi?

Negocistoj, kiuj tien kaj reen vojaĝus inter Hindujo kaj la Mediteraneo subite rimarkus la diferencon en la oraj valutoj. Pro lukrado ili aĉetus oron malmultekostan en Hindujo kaj vendus ĝin multekoste en Mediteraneo. Sekve en Hindujo la mendado de oro fariĝus tro por ies poto kaj ankaŭ la valoro. Samtempe en Mediteraneo kreskus la provizado de oro kaj la valoro samtempe malkreskus. Post kelka tempo la valoro en ambaŭ teritorioj preskaŭ egalus. La kredo al oro en Mediteraneo sekve kreskus en Hindujo. Eĉ se la hindianoj ne bone sciis kiel uzi oron, nur la sopiro de la mediteraneaj popoloj instigus tiun de Hindujo. Tiel la fakto, ke aliuloj fidas al konkoj, dolaroj aŭ diĝitaj datumoj sufiĉas por kriklevi nian fidon, eĉ se ni malŝatas, detestas aŭ mokridas ilin. Kristanoj kaj islamanoj, kiuj tute ne konsentas pri religiaj aferoj, tamen finfine konsentus pri monaj aferoj, ĉar la bazo de religio estas kredo, sed por mono sufiĉas, ke oni fidas kion fidas aliuloj.

Dum multaj jarcentoj filozofoj, famaj pensuloj kaj profetoj estis kalumniintaj monon kaj nomis ĝin radiko de la malbono, tamen mono ankaŭ estas la pinto de interhoma toleremo. Ĝi estas pli honesta ol lingvoj, ŝtataj leĝoj, kulturaj kondutpreceptoj, religiaj konvinkoj kaj sociaj kutumoj. Mono estas la nura de homoj kreita sistemo bazita sur fido, kiu kapablas superponti preskaŭ ĉiun kulturan ravinon kaj kiu ne diskriminacias surbaze de religio, sekso, raso, aĝo aŭ seksa prefero. Dank'al mono eĉ homoj, kiuj nek konas, nek fidas unu la alian, tamen efektive povas kunlabori.

Fonto: Google

Traduko kaj prilaborado: Bert

Inter kriptovalutoj kaj R5: kaj ni?

Dum la lastaj jardekoj la ekonomia povo en Esperantio gravitis ĉirkaŭ Roterdamo, esence ĉirkaŭ la nederlanda guldeno kaj poste eŭro. Ne estis ĉiam tiel: antaŭ la unua mondmilito bone funkciis kriptovaluto kun telematika banko en Londono, sendependa de la Centra Oficejo en Parizo kaj de UEA en Ĝenevo; post la dua mondmilito funkciis el Nederlando alia kriptovaluto, ankaŭ sendependa de UEA.

La plena sukceso de la speso (atestita eĉ de zamenhofe pregitaj proverboj) kaj la relativa sukceso de la stelo meritas profundan ana-

tantigo de la kurzoj en la diversaj EU-ŝtatoj. Tiel eŭroj iĝis kvazaŭ alternativo al dolaroj, almenaŭ en Europo kaj en kulture eŭropcentraj realaĵoj, kiel la E-istaro.

Serioza klopodo dedolarizi la mondan ekonomion komenciĝis lastatempe, fare de Brazilo, Rusio, Hindio, Popola Ĉinio kaj Sud-Afrika Respubliko, al kiuj necesas aldoni aliajn kontraŭokcidentajn ŝtatojn, unuavice Iranon. Ankaŭ ili volas krei komunan valuton, kiu havas provizoran nomon, aŭ siglon: R5, el la hazarde sama komencilitero de la kvin ĉefaj (realo, rublo,



Kvankam unu ne inspiris la alian, la reverso de la spesmilo kaj de la Civita speso (arĝente pregita en Meksiko) montras praktike la saman blazonon.

lizon; certe efikis la makrosocia kunteksto, sed ankaŭ influis la kuplitemo al privatula iniciato anstataŭ specifa E-movado, kia estis Universala Ligo (ĉesinta en 1993).

Interesa estas la fakto ke la ekonomio de Esperantio evitis dependon de la usona dolaro, kiu rolis kiel monda referenca valuto post la dua mondmilito. Kontraŭ la dolara poluseco rezistis la valutpolitiko de eŭropaj landoj (precipe la Francio de generalo De Gaulle) kaj fine la enkonduko de la EU-valuto, pasante unue tra la kons-

rupio, renminbio, rando) kaj eĉ de la irana rialo.

En Esperantio, kie ĉio havas lingvan faceton, la "ruino de la anglosfero" (laŭ difino pri la dolara influareo kaj la koncerna plej uzata lingvo) aparte plaĉus al finvenkistoj, kaj ne hazarde multaj el ili (inkluzive de prezidintoj en anglalingvaj landoj) simpatias al Pekino aŭ Lula da Silva.

Sed la vojo al R5 ne estas facila: tion oni konstato en Kazano, 22-24 okt 24, kadre de internacia konferenco celanta rompi valutan (kaj geopolitikan) hegemonion de nordo kaj okcidento; kvankam unu el la laborlingvoj certe estos la angla, almenaŭ la globiŝa...

Giorgio Silfer

Spesa vendopaŭzo



Ekde 19 jan 26 ĝis nova komuniko fonduso Pro Esperanto ne vendas la Zamenhof-medalon, nome spesojn. La decido celas preventi spekulacion, pro la baldaŭa altigo de la valoro de la Civita monero.

Lastatempe la valoro de arĝento pli ol duobliĝis: unu unco superas jam okdek dolarojn. La speso, el pura arĝento 999/1000, pezas duonan uncon, kio per si mem egalas al pli ol kvardek USD. Al tio necesas aldoni la kostojn de la desegno, pregado ktp.



Diferenco inter la iama speso (1912) kaj la stelo (1960), ambaŭ arĝentaj, estis ke speso originis el E-ista banko, kiu efektive funkciis, stelo ne. Ankaŭ la Civita speso originas el E-ista telematika banko, sed rezervita al Esperantianoj (paktintoj kaj civitanoj).

Krome, la nuna speso estas referenca kalkulunuo, menciita en la Civitaj normoj, tiel ke ne necesas nacia valuto, kriptan valuto aŭ aktualigo laŭ la inflacio. La sumoj estas ĉiam la samaj, nur la valoro kreskas, ĉar arĝento konstante plikariĝas. Tial konvenas aceti la Z-medalon.

Fonto: "Heroldo de Esperanto" Numero 8 (2358), 100a jarkolekto, septembro 2024

Fonto: "Heroldo de Esperanto" Numero 11 (2372) 101a jarkolekto, decembro 2025

RETPOŜTO

de vi por ni!

Reagoj kaj konversacioj

21.01.2026 15:38

Saluton, kara Jozefo,

jes, mi ankoraŭ vivas, kaj unuavice volas pardonpeti pro la prokrasto de nia nova, malneta numero. Krom iom malpli bona sano (kiel vi mem fartas?), ĉefe ŝuldis la kompleta difekto de nia ttt-instalaĵo kaj du semajnoj sen komputilo kaj televido, ĝis finfine alvenis riparisto, kiu post nur kvarono da horo sukcesis solvi la problemon.

Mi, laŭ konata kutimo, denove petas vin provlegi la artikolojn kaj jam antaŭdankas vin tutkore.

Amike,

Bert

27.01.2026 13:15

Kara Bert,

bedaŭre mi nun vidas, ke pro familiaj perturboj mi forgesis sendi al vi la provlegitaĵon. Eble mi ne tro malfruas. Kiel Zamenhof diris: "Pli bone malfrue ol neniam".

Mi mem bone fartas, se ne kalkuli la sekvojn de la aĝiĝo, kaj ankaŭ mia komputilo sanas kaj viglas. Mi esperas, ke la nova jaro pli glate glitos malgraŭ la komencaj stumbletoj.

Amike: Jozefo



30.01.2026 11:12

Kara Bert!

Dankon pro tiu numero de la ENA-revuo.

Numismate salutas

Walter Klag

30.01.2026 13:52

Kara Bert, kara Josef, kara Alfred!

Sube kelkaj malnetaj ideoj pri la Nordia Oro.

Amike salutas Walter

Kurzo de la dolaro		
K = 1,1947 \$ por 1 €		
2026 01 30		
A	B	C = B oble A dividite per K
	Prezo	Nordia Oro
		€ de la metalo en la alojo
89 % Kupfer kupro	13 843,40 \$ t ⁻¹	10312
5 % Aluminium aluminio	3 267,73 \$ t ⁻¹	137
5 % Zink zinko	3 486,15 \$ t ⁻¹	145
1 % Zinn stano	56 551,00 \$ t ⁻¹	473
		Sumo = 11067 € por unu tuno da Nordia Oro

1 kg da Nordia Oro kostas 11,07 €.

Aŭtomate tradukita el la germana: “Nordia Oro estas latuna alojo konsistanta el 89% kupro, 5% aluminio, 5% zinko, kaj 1% stano; ĝi ne enhavas oron. Ĝi havas densecon de proksimume 7.89 kg/dm³ kaj estas nemagneta. Ĉi tiu alojo estas uzata por produkti eŭro-monerojn kun nominalaj valoroj de 10, 20, kaj 50 eŭro-cendoj kaj antaŭe estis uzata kiel moneralojo en iuj landoj. Ĝi estis origine evoluigita por la sveda 10-krona monero, de kiu ĝi prenas sian nomon (svede: nordiskt guld). Gravaj dezajnraj kriterioj, kiujn Nordia Oro plenumis tiutempe, estis: ora koloro de la alojo, malalta emo makuliĝi aŭ miskoloriĝi, bona modlebleco por monerfarado, alta daŭreco kaj eluziĝrezisto, malalta alergena potencialo. Ĉar Nordia Oro ne enhavas nikelon, la risiko de kontaktaj alergioj estas malalta. Aliaj Valutoj en Nordia Oro Fine de la 1950-aj jaroj, la hispana 1-peseta monero estis monfarita el nordia oro. La armena 200-drama monero?”

08.02.2026 10:11

Fantaziaj moneroj per AI



Walter Klag

11.02.2026 15:37



Walter Klag

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

30.01.2026 22:21

Feliĉan novan jaron, kara Bert, kaj koran dankon por la sendado de la nova eldono de la ENA-revuo. Kore salutas Andreas.

Andreas Diemel

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

31.01.2026 3:17

Elkoran dankon, Bert

Kiel kutime, mi aldonis la revuon al Vikiflandrio.

<ena-j13n1-202601.pdf>

Elkorajn salutojn,

Albert Claesen

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

31.01.2026 13:13

Bonan tagon, kara Bert!

La freŝan numeron de ENA mi ricevis. Dankon!.

Anatolo Sidorov

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

31.01.2026 13:35

Kara Bert,

dankon pro la nova ENA-revuo. Mi senprobleme prenis ĝin rekte el mia gmail-retadreso.

Mi plu staĝas en Herzberg, ĝis Pasko. Tial mi rememorigas vin pri via intenco priskribi la herzbergajn murmedalojn, por ke mi eventuale povu helpi al vi tiurilate.

Amike, korsalutante vin kaj vian ĉarman edzinon Vivienne,

via malskribema

Fejfi

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

01.02.2026 14:30

Karaj Bert kaj Vivienne,

Unue mi ŝatus nome de Hans kaj mi deziri al vi ambaŭ plej eblan bonan sanon, krome multe da feliĉo kaj sukceso en viaj aktivecoj.

Due gratuli vin pro la nova ENA-revuo kiu denove surprizigis pro la ampleksaj kaj interesaj infomoj rilate la numismatiko kaj Esperanto.

Amike,

Katja Lödör

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

01.02.2026 16:42

Dankon, Bert, tre utila kaj utiligebla listo de la revuoj ENA por mi.

Josef Kříž (Kriz-Kruco)

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

02.02.2026 10:53

Bert,

En la nova ENA-revuo vi skribis 'Ni ja ne dubas, ke ankoraŭ multaj medaloj ie en Esperantujo restas provizore sub la radaro kaj atendas malkovron'.

Meze de la pasinta jaro Anatolo Sidorov (anasido@gmail.com) proponis al mi grandan kvanton da bitigitaj rusaj libroj kaj revuoj. Mi nur povis doni al li parte pozitivan respondon, ĉar nun IEspA ne vere havas la rimedojn por bone konservi tiajn dokumentojn.

Aliflanke, li multe helpis min per esplorado en rusaj arkivoj. Verŝajne utilas kontakti lin.

Roland

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

02.02.2026 15:45

Saluton Bert

Koran dankon pro la informo.

Amike

Liliane Ketelers

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

08.02.2026 11:38

Estimata samidean(in)o!

Sur la koverto de via revuo 2013 (4) mi vidis foton de Vilĉjo Harmon kun honora medalo. Vane mi serĉis fotojn de la du flankoj kaj mezurojn kaj aliajn informojn pri tiu tre interesa medalo. Unuavice interesa, ĉar usonaj esperantaj medaloj estas raregaj (mi supozas!) kaj aliflanke mi dezirus aldoni ĝin al la unua numismatika katalogo pri esperanta numismatiko, kiu baldaŭ aperos.

Mi do petas vin helpi min aŭ mencii la retadreson de persono kiu povus eventuale kunlabori!

Samideane kaj numismate,

Bert Boon

10.02.2026 2:15

Saluton, Bert!

Mi kredas, ke mi klopodu turni min al familiano de Vilĉjo - mi plusendos tiun ĉi vian retmesaĝon, kun via kontaktinformo, viapermese, ke tiu kontaktu vin okaze je plia informo prie.

Ĉu en ordo laŭ vi tiel?

Samideane,
Alena

Usona Esperantisto



12.02.2026 16:04

Kara Anatolo!

Kiel vi fartas? Mi esperas, ke via sanstato estas pli bona ol la mia .

Antaŭ ne longe mi vidis artikolon kun du medaloj kaj la teksto "La unuaj esperantaj medaloj de Sovetunio 1983". Unu el ili (kun kapo)mi jam priskribis en nia ENA- revuo .

Pri la alia mi bezonas mezurojn (diametron, dikon, pezon) kaj klarigojn (medaliston, kvanton faritan, jarindikon, materialon ktp)

Mi jam kore antaŭdankas vin pro iu ajn informon!

Amike kaj numismate,

Bert



12.02.2026 18:44

Bonan vesperon, kara Bert!

La informo por mi estas sensacia, ĉar mi mem kompilas liston de E-rekordoj en nia lando: de Rusia Imperio tra Sovetio ĝis Rusia Federacio. Pri la medaloj mi sciis nenion. Tamen mi komencis serĉi kaj trovis:

medalisto estas Are Haab, la medalo estas kupra, diametre 50 mm, lokita en ligna skatolo. Sur la unua flanko estas kapo de la kantanta dio Vanemuine kaj la teksto "Arta konkurso KANNEL", sur la dorsa flanko estas la mapo de Estonio, kie la E-kvinpinto indikas urbon Tartu.

Ankaŭ estas produktita medalo "Hilda Dresen" en leda skatolo.

Pri medalisto Are Haab mi trovis nenion. Hilda Dresen estas mondfama estona esperantistino.

La Art-konkursoj startis en 1982 jaro. Kvanto de medaloj ne estas indikita. Pri pezo: se vi havas informojn pri kupra medalo 50 mm diametre - la pezo estas egala.

Aldone mi sendas presorganon "Cejano" en PDF-formato. La detaloj estas en ĝi.

Kara Bert, estu sana!

Amike, Anatolo.Sidorov

19 02 2026 6:59

Kara Bert!

Bedaŭrinde ĉiuj miaj serĉoj pri la medaloj donis nulan rezulton. Tute ne estas informoj pri Art-konkursoj okazintaj en Estonio meze de la 1980-aj jaroj. Mi ne trovis bildojn de la medaloj kaj ĝiaj detaloj.

Amike,

Anatolo

19 02 2026 15:17

Kara Anatolo!

Mi tutkore dankas vin pro viaj penoj, sed evidente mi daŭrigos esplori anstataŭ rezigni. Do, iam sukceso aperos!

Amike kaj numismate kaj reciproke je via servo,

Bert



12.02.2026 20:05

Kara Miguel,

*Esperante, ke la nova numero de la ENA-revuo plaĉis al vi, mi kuraĝetas denove peti al vi sendi bildon kaj informojn (ekzemploj en "Moneroj & Medaloj") **almenaŭ pri unu** el tiuj du, de mi ne jam priskribitaj medaloj, pri kiuj vi parolas en via mesaĝo ĉi sube.*

Se tio kaŭzus kostojn, mi volonte repagus.

Jam mi tutkore anticipe dankas vin!

Amike kaj numismate,

Bert

13.02.2026 19:37

Saluton, Bert! Pardonon, ke mi ne respondis pli frue.

Jen priskribo de la honormedalo de Alliance Française al Benjamin Camozato:

Lando: Francio (?)

Metal: bronzo laŭ la vendejo de kiu mi aĉetis ĝin ("Zeppelin Filatélica & Numismática"), el Porto Alegre).

Diametro: 5 cm

Jaro: 1947 (laŭ la reverso de la medalo, tamen vd. mian atentigon malsupre)

Kvanto: supozeble nur unu kun la nomo de Camozato

Pezo: 63 g

Medalista: H. Dropsy (laŭ la averso de la medalo). Temas pri Henri Dropsy: https://en.wikipedia.org/wiki/Henri_Dropsy

Diko: pro la reliefoj, kompreneble ne estas ununura dikedo. Parto senreliefa dikas proksimume 3 mm.

Mi hazarde trovis kaj aĉetis la medalon fine de 2019. Bildoserĉo per Google indikas, ke la medaloj estis produktataj kun malplena spaco en la supro de la reverso. Jen ekzemplo: <https://www.inumis.com/shop/iie-republique-lalliance-francaise-par-dropsy-s-d-paris-1409947/> Poste, oni laŭbezone ion aldonan cizelis

Jen ekzemplo: <https://monnaiesmedailles17.com/11413-product.html>. Mia medalo estas omaĝo al Benjamin Camozato, el la jaro 1947. Mi supozas, ke ĝi estas unika, kaj ke siatempe ĝi estis donacita al Camozato mem. Cetere, povas esti, ke la medalo mem estis produktita antaŭ 1947, kaj atendis "virga" en deponejo kelkan tempon. Kaj povas esti, ke la medalo estas el Francio, sed la surskribo farita en Brazilo.

Resumon de la vivo kaj de la Esperanto-agado de Camozato vi povos trovi en la jam menciita prelego de James Piton: https://www.youtube.com/watch?v=N_lbO_iJTLE. Mi ne scias ekzakte, kiuj meritoj ĉe Alliance Française kvalifikis lin por tiu medalo. Komence de 2020 mi sendis mesaĝon pri tio al la sekretario de Alliance Française en Porto Alegre, sed ne venis respondo. Mi povus reprovi, provi

kontakti aliajn sekretariejojn de Alliance Française ktp., sed mi kredas, ke ne indas. Necesus bonvolema oficisto disponanta bone ordigitan arkivon, kio bedaŭrinde estas tro rara afero.

Mi tamen scias, ke Camosato havis ligojn al Francio; li studis odontologion tie, kaj lia periodaĵo "O Brasil Philatelico" enhavis partojn en la franca.

Vi vidas, do, ke tiu medalo havas nur flankan rilaton al Esperanto: temas pri omaĝo al esperantisto, sed (plej verŝajne) ne pro liaj Esperanto-movadaj atingoj. Vi decidu, ĉu ĝi taŭgas por la revuo kaj por la katalogo.

Pri la alia medalo (1^a Corrida e Caminhada Esperanto pela Paz e Diversidade) mi ankoraŭ enketas ĉe la iniciatinto. Mi esperas baldaŭ reskribi al vi pri tio.

Pri la "Flor-Ludoj" de KKE (Kultura Kooperativo de Esperantistoj): mi trovis vian partan priskribon en Esperanta Numismatiko 2/2022. Estus bone scii, kie vi trovis tiujn informojn (precipe la bildon kaj tion, ke ĝi estas el la fruaj 1980-aj jaroj). Tio povus esti utila en la serĉado de pliaj detaloj. Ĉiokaze, mi foliumis numerojn de "Brazila Esperantisto" kaj "Bulteno de Brazila Konsilantaro de Esperanto" el tiu tempo (tiujn, kiujn mi disponas), sed bedaŭrinde mi nenion trovis. Tial, mi hodiaŭ telefonis al Givanildo Costa, la motoro de KKE. Li diris, ke tiu iniciato okazis antaŭ ol li ekaktivis, kaj ke do li ne scias parkere la detalojn, sed la afero ne estas tute fremda al li. Li kredas, ke en la stoko de KKE ankoraŭ restas kelkaj ekzempleroj de tiu medalo. Aldone, li promesis priesplori la arkivon de KKE kaj la tiutempajn numerojn de la revuo Kooperativismo (kiujn mi ne disponas). Espereble post kelkaj tagoj li do raportos al ni pri la rezultoj de tiu esplorado.

Amike,

Mihaelo Bento



18 02 2026 21:15

Saluton kara Miguel!

Multan dankon pro via ampleksa informado. La medalo al Benjamin certe estos utila por nia revuo. Mi nur devos decidi en kiu rubriko...Flanka rilato ankaŭ meritas atenton dank'al tiom da informoj.

La fakto, ke vi trovis ligon al la "Flor Ludoj" kaj ke kelkaj ekzempleroj estus ankoraŭ en iu stoko, estus bona novaĵo por mia persona kolekto! Se eble mi aĉetus minimume unu ekzempleron... Jen ankaŭ ebleco kompletigi la priskribon en nia revuo.

Vi certe komprenas, ke mi estas vere scivolema!

Multan dankon kaj reciproke iel je via servo...

Amike kaj numismate,

Bert

24 02 2026 14:29

Saluton, kara Bert!

Jen priskribo de la medalo de la "1^a Corrida e Caminhada Esperanto pela Paz e Diversidade" (1-a Kurado kaj Paŝado Esperanto por Paco kaj Diverseco):

Lando: Brazilo

Metalo: zamako kun old-argenta tego (vd. sube)

Diametro: ĉ. 9 cm

Jaro: 2018 Kvanto: ĉ. 300? (vd. sube)

Pezo: ĉ. 98 g (kun la rubando) (mi pesis)

Medalisto: ? (vd. sube)

Diko: ĉ. 4,5 mm (je la rando, kiu estas pli dika ol la mezo, kaj ne estas same dika en ĉiuj lokoj) (mi mezuris)

La 3-an de Junio 2018, matene, en la lasta tago de la 53-a Brazilia Kongreso de Esperanto (BKE), en Curitiba (Kuritiba), okazis la "1-a Kurado kaj Paŝado Esperanto por Paco kaj Diverseco". La koncerna medalo estas partopren-medalo, kiun oni ricevis je la alveno. La ekzemplero kiun mi disponas apartenas ne al mi, sed al Biblioteko Ary Zamora (<https://esperantors.net.br/biblioteko/>). Ĝi estis en la postlasaĵo de Alcione Fernandes, kiu partoprenis la paŝadon en 2018 kaj forpasis en 2021. Mi mem ne partoprenis, mi preferis resti en la hotela lito!!

Jen kelkaj ligiloj pri tiu evento:

<https://blogdopaulosergioviana.blogspot.com/2018/06/vibrante-congresso-de-esperanto-em.html>

<https://www.youtube.com/watch?v=-c2a-UoMgHs>

<https://www.youtube.com/watch?v=Z4pR0zotqUk>

<https://www.facebook.com/photo/?fbid=1484351335004584&set=pb.100064346693803.-2207520000>

(vd. ankaŭ la apudajn fotojn, kaj ke ankaŭ speciala T-ĉemizo estis produktita)

Flanke de la esperantistoj, la iniciatinto kaj ĉeforganizanto estis Ariádene Valenga. Por la konkreta okazigo de la afero tamen estis kontraktita faka firmao, Elite Eventos Esportivos. Estis trovitaj tri sponsoroj, kies emblemoj aperas en la rubando kaj en la reverso de la medalo: Transamérica (radi-stacio), 361° (sporta vendejo) kaj Procorrer (sporta vendejo). En la malnova Instagram-paĝo de Elite ankoraŭ troveblas pluraj afiŝoj pri la okazaĵo (ekz.: <https://www.instagram.com/p/BjoIE0GBQz3/>).

Kun la celo informi pri kelkaj datumoj (metalo, kvanto, medalisto) mi sendis mesaĝon al Ariádene, sed bedaŭrinde ŝi ne povis multe helpi. Jam pasis pluraj jaroj, ŝi ne plu havas la tiamajn mesaĝojn kaj, plej grave kaj bedaŭrinde, la eta firmao Elite ne plu ekzistas, ĉar ĝia posedanto kaj motoro, Rafael Feijó, forpasis en 2020. Ariádene sendis al mi la telefonnumeron de Juliano Mora, iama oficisto de Elite, kaj mi mesaĝis al li, sed li same ne povis multe helpi. Per enskribo sur la medalo mi tamen povis eltrovi, ke ĝin fabrikis la entrepreno REMA Arte Esporte, el la urbo Caxias do Sul. Mi mesaĝis al ili, kaj ili almenaŭ povis respondi al unu el la demandoj: la medalo estas el "liga zamaq, com o banho em prata envelhecido". Se mi bone komprenas, tio signifas ke la medalo estas el aloj nomata zamako, tegita (elektrolamenita) per arĝento, kiu poste submetiĝas al iu proceduro kiu igas ĝin aspekti malbrila kaj malhela ("olda arĝento").

Neniu scias, kiu estas la medalisto (tiu, kiu dezajnis la medalon). Ariádene memoras, ke Rafael Feijó sendadis la skizojn por ŝia aprobo. Povas esti, ke Rafael Feijó mem preparis la dezajnon (Juliano Mora konfirmis, ke li kelkfoje faris tion, sed ne ĉiam). Ankaŭ Juliano mem kelkfoje ion dezajnis, sed li diris, ke tiu medalo ne estas lia kreaĵo. Povas esti, ke ĝi estas verko de iu alia tiam oficisto de Elite. Ankaŭ eblas, ke iu oficisto de Rema ion adaptis, aŭ eĉ kreis ĉion de nulo.

Ankaŭ pri la kvanto neniu povis precize informi. Mi do demandis al Ariádene pri la kvanto de partoprenintoj en la evento. Laŭ ŝi, estis 300 homoj, sed laŭ komento de Vicente Sales en unu el la supre menciitaj filmetoj, "en la kuradoj (4Km e 8Km) partoprenis 330 kurantoj, certe 19 el ili estas esperantistoj, eble pli. En la marŝado partoprenis pli granda nombro da esperantistoj."

Bedaŭrinde ankoraŭ ne okazis la 2-a, 3-a... eldonoj de tiu evento, kvankam oni plurfoje parolis pri tio. Tamen ekzistas la iniciato Esperanto Kuras (<https://www.instagram.com/esperantokuras/>), kies ĉefa aktivulo estas ĝuste Vicente Sales.

Givanildo ankoraŭ ne rekontaktis min pri la "Flor-Ludoj". Se tio ne okazos post kelkaj tagoj, mi retelefonos al li.

Amike,

Miĥaelo

25 02 2026 11:39

Saluton, kara Miguel!

Mi ne scias kiel sufiĉe kaj dece danki vin pro viaj profundaj laboro kaj korespondado kun diversaj personoj pri la du medaloj, kiuj evidente ambaŭ ricevos definitivitan lokon en la revuo kaj la estonta katalogo de ENA.

Surbaze de viaj detalaj informoj mi sukcesos pentri tre taŭgan priskribon kun bonkvalitaj fotoj! Nun mi studu la li ligilojn por "kolorigi" la prezentadon en la revuo!

Vi certe meritas dankegon. Mi ĝis hodiaŭ neniam ricevis tian kompletan klarigon! Vi meritas ekde nun esti nomata vera membro de la ENA-redakcio...

Amike kaj numismate,

Bert (Alberto)

24 02 2026 14:30



25 02 2026 13:31



Ne dankinde!

Tamen memoru, ke mi ne vere estas kolektanto... mi havas nur malmultajn medaletojn, kiujn oni donacis al mi, aŭ kiuj ial allogis min kaj mi povis aĉeti kontraŭ nealta prezo.

Ĉiuokaze, mi ĵus kontrolis, ĉu hazarde vi ankoraŭ ne priskribis ion el mia modesta kolekto. Kaj mi ne sukcesis trovi en la numeroj de Esperanta Numismatiko priskribon de du medaletoj (pingloj), kies fotojn mi sendas. Mi tamen supozas, ke ili fakte jam estas bone konataj de vi, kaj ke mi simple ne estis sufiĉe lerta por trovi ilin en EN...!

Amike,

Mihaelo

25 02 2026 14:33

Pinglojn mi ne priskribas, nur medalojn, plaketojn ktp. Eĉepte ankaŭ medalojn poste adaptitaj per fermilo por esti uzotaj ekz. por kongresoj ktp... Originalaj pingloj abundas, tiel ke aparta katalogo iam estu eldonita, sed ne de mi pro mia aĝo, mi bedaŭras...

Bert

25 02 2026 18:41

Komprenite!

Amike,

Mihaelo

25.02.2026 16:59



Jen por viaj arkivoj bildoj de la seula medalo kaj kopio de la vankuvera glumarko.

Ne forgesu, ke mi, kiam mi havis vian aĝon (nun mi estas 77-jara) havis nur kelkajn medalojn...

Amike,

Bert

25.02.2026 17:17

Dankon! Mi fakte posedas ekzempleron de tiu medalo, sed mi vidis, ke vi jam priskribis ĝin. La demando estas, ĉu vi jam priskribis en Esperanta Numismatiko la du pinglojn kiujn mi montris en la antaŭa mesaĝo. Se jes, pri kiuj numeroj de EN temas? Se ne, mi povos almenaŭ pesi kaj mezuri ilin por vi.

Amike,

Miĥaelo

02 03 2026 16:31

Resaluton, kara Bert!

Hodiaŭ mi rekontaktis Givanildo-n pri la medalo "I BIEFLOR". Li efektive retrovis stoketon kun ĉ. 30 ekzempleroj, kaj sendis ĉi tiujn fotojn. Li tamen ne priserĉis la arkivon de KKE, do ni ankoraŭ ne havas pliajn informojn pri la "kunteksto" de tiu medalo. Li nun diris, ke li demandos veteranajn membrojn de KKE pri la afero.



Givanildo pretas vendi al vi ekzempleron, sed li iom hezitis pri la sendomaniero. Efektive tio povas esti iomete komplikita por sensperta homo, ĉar estas kelkaj burokrataĵoj kaj la poŝt oficistoj ofte estas harhirtige nekompetentaj. Se necesos, li povos sendi ekzempleron al mi, por ke mi plusendu al vi (sendoj ene de Brazilo estas multe pli facilaj ol sendoj al la eksterlando).

Voku lin per WhatsApp (li ne emas korespondi skribe, li preferas babili voĉe). Estu preta por karioka (riodejanejr-urba) akĉento, kaj por tio, ke li invitos vin intervjuiĝi kadre de lia ĉiusemajna radioprogramero!

Amike,

Miĥaelo

04.03.2026 21:36

Saluton, kara amiko Miĥaelo!

Jen denove bonaj novaĵoj kaj tre interesaj informoj! Dankon!!! Eble Givanildo trovos faktojn pri la historieto, kiel la jaron kaj la nomon "Bieflor"... Mi jam regule legis pri la t.n. "Floraj Ludoj" en la historio de Esperanto, jam de longe organizita literatura festo pri deklamado de esperantaj poemoj.

*Ege, ege interesaj estas la kunsenditaj fotoj kaj mi jam ĝojas povi aĉeti ekzempleron (ĉu eble du?). Evidente mi pagos al vi LA KOMPLETAJN KOSTOJN por tiel povi repagi al vi kaj Givanildo! Mi do bezonos minimume la nomon de via banko, ĝian poŝtan adreson, eventualajn bankajn kodojn, la ŝuldotan sumon ktp. Bonvolu sendi la pakadon kiel vi kaj Givanildo preferas, **registrite, se eble**, al mia adreso en BELGIO: BERT BOON, LIJSTERBESLAAN 13, 9630 Munkzwalm.*

Amike kaj numismate,

Bert

04.03.2026 22:54

Saluton!

Laŭ via propra priskribo en Esperanta Numismatiko 2/2022, BIEFLOR = **B**razila **I**nternacia **E**kspozicio de **F**LORoj.

Givanildo fakte atendas, ke vi mem telefonu al li kaj rekte intertraktu kun li pri la afero. Se vi tamen ne volas fari tion, supozeble mi povas esti la peranto. Kion vi preferas? Pri la prezo li ankoraŭ nenion diris.

Amike,

Miĥaelo

05.03.2026 14:46

Resalute, kara Miguel!

Mi fakte konas la signifon de BIEFLOR, sed tio montras, ke ĝi estis versajne tute alia evento ol la internacia literatura festo pri kiu mi parolis en mia antaŭa letero, ĉu ne? Floraj Ludoj estis do esperanta evento, Bieflor ne, se mi ne eraras... Jen interesa aspekto, ĉar sur la medalo estas ankaŭ esperantaj vortoj!!!

Mi certe mem baldaŭ telefonos al Givanildo. Mi devas decidi je kioma horo.

Do provizore vi ne bezonos esti peranto de la intertraktado pri la prezo ktp, nur pri la sendo de la objektoj respektive de Givanildo al vi kaj de vi al mi. Pri la pago de miaj ŝuldoj, ni sekve povos interparoli, se vi konsentas.

Pliajn elementojn do en nia nova korespondado. Multan antaŭdankon!

Bert

05.03.2026 14:55

Mi supozas, ke BIEFLOR estis neesperantista evento, kadre de kiu oni sukcesis okazigi esperantan literaturan festeton, sed ni ankoraŭ havas nenion konkretan por bazi tiun supozon!

Vi povas telefoni al Givanildo jam nun, aŭ post ĉ. unu horo. Kutime li telefonas al mi proksimume tagmeze (16h posttagmeze ĉe vi), kio kelkfoje estas malkonvena por mi, ĉar tiam mi tagmanĝas. Se mi ne mismemoras, li kutimas tagmanĝi malfrue.

Amike,

Mihaelo



20.02.2026 18:04

Saluton Bert kiel vi fartas? La ligilo por la revuo numero 1 de 2026 estas malĝusta en la retejo; alklako de la ligilo redirektas nin al numero 1 de 2025... Kaj mi tradukas artikolon, kiun mi verkis; ĝis kiam mi devas sendi ĝin por numero 2 de 2026? Dankon kaj korajn salutojn!

Rafael Augusto.

22.02.2026 17:33

Saluton Rafael Augusto!

Vi tute pravis kaj mi tuj kontaktis nian retejstron Frank Merla kiu sciigis al mi ke li dume jam korektis la eraron. Bonvolu konfirmi ke vi povis elŝuti la novan numeron.

Rilate al via, danke akceptota, artikolo mi povas jam rezervi por ĝi lokon, se vi povus diri al mi en kiu rubriko ĝi pli bone decos. Mi petas vin sendi la tekston je la komenco de la monato aprilo.

Mi anticipe dankas vin kaj deziras ke vi fartos bone!

Bert



22.02.2026 15:38

Saluton, Kara Frank!

Membro atentigis min pri la fakto ke la nova revuo (JK13N1) estas hazarde anstataŭigita per la unua numero de 2025. Se eble, bonvolu korekti en la tabelo.

Mi anticipe dankas vin tutkore,

Bert

22.02.2026 16:32

Saluton, kara Bert!

Koran dankon pro la atentigo. Mi korektis la eraron.

Dankinde diras Frank Merla

ANONCOJ

&

EVENTOJ

03 03 2026 15:18

En majo 2026 aperos nova monero-medalo 200 STELOJ okaze de la 111-a Universala Kongreso en Graz (Graco) kaj por la honoro de Julia Isbrücker.



Pliaj informoj sekvos.

Amike salutas

Walter Klag

06.03.2026 13:41

Eventuala monero-medalo 2027

Kara Bernhard!

Kopio al Alfred kaj Bert

Por 2027 mi planas eldoni monero-medalon, kiu similos al la 100-Stela monero.

Mi mem financos kaj vendos la medalojn. Aktuale mi serĉas suĵeton.

Du el la multaj eblecoj:

- 112-a Universala Kongreso en Melburno;
- 100 jaroj IEM.

La parametroj:	Maso 31 g	Diametro 40 mm
	Dikeco 3 mm	Materialo latuno
	Eldonkvanto 300	

Produktos ĝin firmao Pichl en Tirolo.

Kiel vi pensas pri tiu plano?

Amike salutas Walter

06.03.2026 14:38

Saluton Walter!

Ankaŭ bona ideo, kiel la mia, laŭ vi en via reago!

Bert

06.03.2026 14:46

Kara Walter,

multan dankon pro la sciigo.

Kiu financos la produktadon?

Ĉu ankaŭ la pasintajn Stelo-monerojn produktis la firmao Pichl en Tirolo aŭ Münze Österreich?

Kial vi ne denove intencas arĝenton kiel materialon?

100 x 100 Stelo-moneroj pri la 100-jariĝo de la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko sonoras interese.

Se mi havus pliajn informojn rilate la notitajn demandojn, mi povus paroli pri tio kun miaj gekolegoj.

Amikajn salutojn kaj agrablan semajnfino,

Bernhard

Mag. Bernhard Tuidier

Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko” en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estis apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol dek jaroj ĝis 171 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŭti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).

Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”

bert.boon@skynet.be